

Numero: 300.  
Majo 2017.

25-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



300-A

Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

# 300 - a

## Komenco

Antaŭ 300 monatoj startis mia modesta esperantolingva eldonaĵo: **VESPERTO LITERATURAJ FOLIOJ**.

Mi ĉiam deziris redakti gazeton. Min tre interesas la ĵurnalismo.

Tiutempe ankoraŭ la interreto ne estis tiom disvastiĝinta, kiel nun. Ne ĉiu havis komputilon kaj se tamen iu posedis ĝin, tio estis miraklo. Ankaŭ mi nur revadis pri ĝi. Se mi memoras ĝuste la unuaj numeroj estis skribitaj per tajpilo.



Estis granda paŝo, kiam mi akiris komputilon C/64 kaj praprintilon. Vere ne estis solvita la multobligado.



Dank' al mia bona esperantista amiko Péter Vukov, kiu helpis en ĝi. Li havis presistan konatulon, kiu longtempe kopiis mian eldonaĵon senpage.

Denaske Vesperton kiu ajn povis aboni. Sufiĉis sendi nur poŝtmarkon kaj mi jam sendis ĝin al la abonanto.

La unuaj numeroj estis unupaĝaj. Ambaŭflanke estis la artikoloj. Mi aperigis la verkaĵojn, versetojn de komencantoj.

Multaj literaturaj gazetoj, revuoj rifuĝas de komencantoj. Iliaj redaktantoj pravos, ĉar la kara Leganto deziras legi valorajn literaturaĵojn.

Sed kiel povas progresi novbakita verkisto, poeto, se liaj/ŝiaj verkaĵoj nenie estas legeblaj. Verkiston povas tre malgajigi, se la noveletoj, versetoj tuj eniĝas tirkeston kaj por ĉiam ili restas tie.

Ĝenerale preskaŭ ĉiu provado de novbakitaj geesperantistoj ekaperis en Vesperto.



Certe estis tiuj, kiuj diris, kial mi faras ĉi tiun. Mia respondo estas mallonga: mi volis helpi al la komencantoj. Iam ankaŭ mi estis komencanta esperantisto, kiu post kelkmonata lernado de la lingvo volis verki. Mi scias, kiom granda ĝojo, se nia verkaĵo ekaperas ie kaj la verkanto revidas sian „idon” en presita formo.

Vesperto ne estas la plej elstara esperantolingva eldonaĵo. Tion ĉi mi bone scias. Mi ne volis konkuri kun aliaj revuoj kaj gazetoj. Mi intencis krei esperantolingvan organon, kiu estas senpaga kaj servas la zamenhofan lingvon.

Dank' al miaj helpantoj jam menciita Vukov Péter, kiu tro frue forlasis nin. Li estis bonega esperantisto kaj naturamiko.



Krome estis la helpantoj Tibor Zsabadi el la urbo Nagykanizsa, József Baksa el la urbo Szeged, Irina Nagy el la urbo Nagyvárad ( nun Oredea Rumanio), Ferenc Kapcsándi (Zalaegerszeg). Fine mi mencias mian plej fidelan helpantinon (kontrolanton) Erzsébet Tuboly, sen kiu mi ne povis ekzisti. Elizabeto ĉiumonate kontrolas miajn manuskriptojn.



Longajn jarojn Vesperto estis presita kaj mi sendadis ĝin per poŝto al la abonantoj kaj al ĉiu kiu petis ĝin.

En tiuj jaroj en Hungario la poŝtaj tarifoj ege plialtiĝis. Kiel mi jam menciis, Vesperto estis, estas kaj estos senpaga, tial ofte ĝia sendado estis tre multekosta.

Al ĉiu mi sendis mian eldonaĵon, kiu ne volis aŭ ne povis sendi poŝtmarkojn. Ĉefe por eksterlandanoj mi sendis ĝin tiel. La eksterlandaj leteroj estis pli malmultekostaj ol la enlandaj.

Mi timis, en iu tago mi ne povos pagi kaj afranki la leterojn kun la sendita eldonaĵo. Mi devis eltrovi ion por solvi ĉi tiun malfacilan situacion.



La solvo venis el „la ĉielo”. Intertempe disvastiĝis interreto. Baldaŭe ĝi jam ne estis miraklo. Preskaŭ en ĉiu hejmo estis komputilo kun interreta konekto.

Venis kuraĝa, eble en la unua momento fantasta ideo: kio okazus, se Vesperto ekaperus rete kaj ekde tiu ĉi tago ĉiu povus legi, elŭti, multobligi, kopii ktp. Krom mia eldonaĵo anstataŭ unu paĝo povis „dikiĝi” je ses paĝoj. Fariĝis pli multe da paĝoj por verkaĵoj, noveletoj, versoj, humuraĵoj kaj aliaj.

Nun jam Vesperto aspektis preskaŭ vera esperantolingva eldonaĵo. Vere mi havis pli multe da laboro pri la redaktado. Sed mi volonte faris tion ĉi.



El la ideo fariĝis realo. Tiam ekaperis nova problemo. Kiel disvastiĝi ĉi tiun retgazeton, ke ĝin atingu multe da geesperantistoj?

Mi ne havis retpaĝon. Krome Vesperto estis redaktita en la programo pdf. Kiel alŭti ĝin al interreto?

Denove helpis al mi la bonŝanco (eble doktoro Zamenhof montris al mi la vojon).

Interrete mi trovis hejmpaĝon (ESPERANTO GAZETEJO). Bedaŭrinde ĝi jam ne ekzistas. Ĉi tiu hejmpaĝo kolektis Esperanto-gazetojn, revuojn kaj eldonaĵojn. Mi alŭtis mian eldonaĵon kaj informis miajn iamajn abonantojn, konatulojn kaj geamikojn, kie ili povas legi aŭ elŭti Vesperton.

Ŝajne ĝi bonege funkciis. Longe mi trankviliĝis pensante, por Vesperto mi trovis taŭgan hejmon, kie ĝi estos atingebla por ĉiam.



Bedaŭrinde en iu tago mi ricevis malgajan novaĵon, ankaŭ ĝi ĉesis. Denove mi devis serĉi alian lokon por Vesperto.

Kiel disvastigi ĝin? Estis la grava demando. Komence mi ne sciis kion fari.

Restis por mi la eblo sendadi ĝin al tiuj, kiuj petas.

En fejsbuko mi anoncis ĉiumonate mian eldonaĵon kaj baldaŭe venis „la abonon” kaj petoj, ke oni deziras ricevi Vesperton.

Nuntempe ĝi funkcias tiel. Sufiĉas sciigi min pri la deziro kaj mi jam sendas ĝin al la petanto.



Pere de fejsbuko multaj geesperantistoj ekkonis Vesperton. Preskaŭ el la tuta mondo alvenis petoj kaj mi sendis ĝin al ili.

Eble nun oni legas ĝin plej multope. Tio ĉi karesadas mian koron. Supozeble mia laboro ne estas vana kaj espereble mi povas ĝojigi multajn geesperantistojn.



Ofte oni demandas min: Kial mi elektis tiun ĉi titolon: VESPERTO LITERATURAJ FOLIOJ?

Mi jam menciis komence, antaŭ multaj jaroj mia bona esperantista amiko Péter Vukov helpis al mi. Per lia helpo mi povis multobligi mian eldonaĵon.

Péter Vukov estis ne nur esperantisto, naturamiko, sed li estis entuziasma speleologo. Onidire en la grotoj vivas vespertoj. Li proponis, ke ni nomu la eldonaĵon tiel.

Tiam ankoraŭ mi ne sciis, kiom longe li povos helpi al mi. Do, mi klinis je lia peto kaj propono.

Krome mi konfesas, mi vidis fantazon en tiu ĉi titolo. Ĝi estis iomete mistera kaj interesa. Ĝi vekis la interesigon de multaj homoj.

Poste kiam jam Péter Vukov ne povis helpi, mi ne deziris ŝanĝi ĝin. Mian literaturan eldonaĵon oni konis tiel. Kiel elekti alian titolon, se ĝi estas konata en Esperantujo.

Do, Kara Leganto ne pensu, ke Vesperto estas ia speleologa gazeto! Vere ni ofte kuraĝe eniras la grotojn de Esperanto literaturo.

Nun jam tiu ĉi titolo restos por ĉiam. Mi ne deziras ŝanĝi ĝin.



Mi ne scias kiom longe mi povos redakti ĝin. Ĉu ankoraŭ ekaperos tricent aliaj numeroj? Estus bone.

Mi deziras servi Esperanton kaj montri al la dubantoj, per nia lingvo Esperanto ĉio estas tradukebla. Ekzistas originala Esperanto literaturo. Ni havas grandiozajn verkistojn, poetojn. Aliflanke per la zamenhofa lingvo jam preskaŭ ĉiu verkaĵoj de la mondliteraturo estas tradukebla.

Utile lerni ĉi tiun lingvon, ĉar ĝi estas uzebla sur ĉiu tereno.

Bedaŭrinde la homaro ankoraŭ ne maturiĝis por vidi ĉi tion. La homoj lernas grandajn naciajn lingvojn. Anstataŭ tio estus pli bone, se Esperanto estus enkondukita en ĉiu lando kaj ŝtato.



Laŭ mi Esperanto naskiĝis tro frue kaj la homaro ankoraŭ ne povas senti kaj vidi ĝian sencon, kiel ĝi povus plifaciligi la ĉiutagan vivon de la homo.

Ni ankoraŭ pensadas en naciaj lingvoj. Sed oni devas scii, se iu nacia lingvo estos akceptita por la dua lingvo de la homaro, tiam de jaro al jaro la etnaj lingvoj rapide formortos.

Jam nun tiu ĉi fenomeno estas sentebla. De sur la terglobo fulmrapide malaperas la lingvoj de etaj popoloj.

Onidire sur Tero ekzistas nun pli ol ses mil lingvoj. Vere estas kiujn oni parolas nur kelkope. Sed ankoraŭ la pli grandaj lingvoj estas minacataj.

Ellerni iun nacian lingvon estas tre malfacila. La lernado bezonas plurajn jarojn. Krome ĝi estas multekosta.

Kompreneble ankoraŭ Esperanton oni devas lerni. Sen lernado ne eblas posedi lingvoscion. Multaj homoj tiam eraras, kiam ili pensas, sufiĉas aĉeti lernolibron aŭ kelkfoje iri al lingvoinstruisto kaj jam mi scias Esperanton. Lingvon oni devas lerni dum la

tuta vivo. Perfekte nenion eblas ellerni. Kompreneble estas gradoj, kiujn oni deziras atingi. Sed poste komenciĝas novaj.



Min amuzigas la redaktado de Esperanto Literaturaj Folioj. Mi ŝatus redakti ĝin ankoraŭ longtempe. Vere mi ne scias, ĉu estos ankoraŭ 300 numeroj. Estus bone.

Krom tio mi ŝatus plialtigi ankaŭ la nivelon. Tio ĉi ne signifos, ke mi ne akceptas la kunlaboron de novbakitaj geesperantistoj.

Mi petas ĉiun, se vi sentas emon por verki kion ajn, poemojn, novelojn, trankvile sendu ĝin al mi kaj ĝi ekaperos en mia eldonaĵo.

Vesperto estu metiejo de la komencantoj!

Esperanto estas tial bonega lingvo, ĉar iam preskaŭ ĉiu estis komencanto. Ankaŭ la plej multescia profesoro de nia lingvo lernis Esperanton.

Nur kelkaj povas diri, ke li/ŝi suĉis Esperanton kun patrinolakto.

Do, ne hontu verki, se en viaj vejnoj fluetas verkista aŭ poeta sango. En iu tago eble el vi fariĝos konata esperantisto, kiu ĝojigos „la loĝantojn de Esperantujo” per siaj verkaĵoj.

En tio ĉi mi ŝatus helpi al vi. Vesperto Literatura Folio estas tia esperantolingva eldonaĵo.

Por ke Vesperto travivu ankoraŭ 300 numerojn, ankoraŭ via laboro estos tre grava.

Ne lasu min sola! Ne nur legu ĝin, sed aktive kontribuu al ĉiu numero kun viaj verkaĵoj, ideoj aŭ kritikoj.

Mi tre esperas, vi helpos al mi.



Kiel vi povus helpi ankoraŭ al mi?

Ankaŭ granda helpo, se vi parolas al viaj esperantistaj geamikoj, gekonatuloj pri Vesperto. Krome, se vi rete sendos ĝin al aliaj geesperantistoj, vi povas multobligi, presi ĝin sen mia permeso.

Vere, se ĝi okazus, mi tre, tre ĝojus, se vi informus min pri ĝi.

Mi esperas, vi komprenas mian deziron kaj en la estonto ni kunlaboros.

Nun mi rememoras pri la unua numero, kiam Vesperto, kiel unu paĝa gazeteto startis.

Kiom granda ĝojo estis ĝin teni en la mano. Mi malkaŝas al vi, ankaŭ nun mi estas ekscitita ĉe ĉiu numero. Mi malpacience atendas, kiel reagas la kara Leganto?

Trankvile skribu la erarojn (gramatikajn aŭ aliajn)! Kio ne plaĉis al vi aŭ kion mi devus plibonigi en la estonto.

Mi ne koleriĝos. Kial koleriĝi? Ja, via kritiko helpas al mi. Stulta homo, kiu koleriĝus pro tio.

Mi klopodas ĝuste koncepti kaj skribi, sed vole nevole la diableto tie kaŝas sin inter la literoj kaj ĝi ruze atendas fari skandaletan.

Kiu redaktis jam gazeton, diversajn eldonaĵojn, tiu certe scias.



Antaŭ mi estas multe da planoj por Vesperto. Mi esperas, mi havos forton por realigi ilin.

Esperanto meritas, ke ni flegu, prizorgu ĝin, kiel bona patrino sian infanon. Tiu ĉi lingvo estas la trezoro de la homaro. Neeble, ke ĝi formortos kaj post jaroj, jardekoj oni tute forgesos ĝin. Esperanton bezonas la homaro, kvankam estas tiuj, kiuj faras ĉion por malhelpi ĝian disvastiĝon sur la tergloba.

Nia lingvo ne estas kontraŭ la naciaj lingvoj. Ni geesperantistoj neniam diras, ke oni ne lernu naciajn lingvojn, eĉ kiu ellernis Esperanton, tiu povos lerni pli facile kaj pli rapide aliajn lingvojn.

Do, neniu timu de Esperanto! Se ĝi estus tute disvastiĝanta en ĉiu lando kaj ĝi estus la dua gepatra lingvo de la homaro, tiam nia vivo certe fariĝus pli bona.

Kompreneble la zamenhofa lingvo ne estas miraklo. Ĝi mem ne povos fari mondopacon, kiel pensas kelkaj adaptoj de Esperanto.

La pacon kaj militon influas multaj aliaj aferoj. Nun mi ne deziras skribi pri tio. Ja, kara Leganto certe scias pri kio mi pensas.



Fine mi petas vin, kara Leganto, subtenu mian eldonaĵon Vesperto Literatura Folio! Sendu viajn verkaĵojn, versojn al mi!

Estu la kunlaboranto de Vesperto! Ni redaktu kune ĝin!

Se vi helpas al mi, tiam mia modesta eldonaĵo ankoraŭ longtempe estos legebla.

Vesperto Literatura Folio estos senpaga ankaŭ en la estonto.

Sufiĉas sendi nur vian retadreson kun peto kaj mi tuj sendos ĝin. Vi povos peti ankaŭ malnovajn numerojn, kiuj ekaperis interrete.

Bedaŭrinde la paperan version mi ne povas sendi nuntempe. Mi klopodas aranĝi ankaŭ ĝin kaj espereble en iu tago ankaŭ ĝi estos atingebla.

Kiu deziras ricevi Vesperton Literaturan Folion, skribu al la sekva adreso:

[apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)

Vi povos sendi al mi leteron ankaŭ per helikopoŝto. Jen mia adreso kaj telefonnumeroj:

**Apáti Kovács Béla**  
**Kaposvár**  
**Béla király u.44.**  
**HU-7400**  
**Hungario**

**06-20-497-03-64**  
**06-82-410-664**

Mi atendas la novajn abonantojn kaj kunlaborantojn. Helpu al mi, ke ankaŭ 600-a numero de Vesperto Literaturaj Folioj povu ekaperi.

Mi tre esperas mia revo realiĝos kaj ankoraŭ longtempe mi povos redakti ĝin.

Krome mi esperas, nia lingvo okupos indan lokon inter la lingvoj de la homaro kaj ĝi plifaciligos nian vivon.

— Redaktanto —



*Bildoj pri la urbo Kaposvár*

